

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)



NIAJ PLANOJ

☛ ĈE LA REGULA KUNVENEJO

En Kanagaŭa-Kenmin Sentaa (= Centro por la gubernianoj de Kanagawa), ĉirkaŭ la Stacidomo Yokohama, okazas jenaj klasoj.

* Regulaj Klasoj en sabato: Rudimenta Kurso / Klaso por legado de "Tra dezerto kaj praarbaro", Klaso por legado de "Vivo de Lanti" / Jokohama Salono.

* Regula Klaso en merkredo.

CELEBRI FINON DE LA KURSO

* julio 21 (sab) 16h30-17h30 ĉambro 705

La Rudimenta Kurso finiĝos, eĉ kun unu lernanto. Ni celebru lin. (Tiu ĉi okazaĵo anstataŭos la kutiman Hama-Rondan Vesperon.)

LEGO-KUNVENO

* sept. 8 (sab) 13h00-15h00 ĉambro 702

* traktota libro: "Lee Chong-Yeong, gvidanto nia: kolektiva verkado en la mondo"



☛ EN LA PARKO "ZOO-NO-HANA"

INTERNACIA FESTO EN AŬTUNO

En la 20a kaj 21a de oktobro, ni partoprenos ekspozicion, kadre de la "Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2012", en la parko "Zoo-no-hana", apud la haveno de Jokohamo. Semajnon poste, nia rondo organizos Rudimentan Kurson, kaj ni esperas, ke la festo estos bona informejo pri la kurso.

TIEL OKAZIS

HAMA-RONDA VESPERO

* junio 16 (sab) 17h00-19h00 ĉambro 705

* preleginto: S-ino DOI Ĉieko

* temo: pri HASAGAWA Teru, t.e. Verda Majo

* 19 kunvenintoj

* enhavo: Esperantistino HASEGAWA Teru, plumnome Verda Majo, naskiĝis antaŭ 100 jaroj. Ŝi iris en Ĉinion, la landon de sia edzo, kaj tie faris agadon kontraŭ la japana agreso en Ĉinion. La preleginto revuis vivon de la geedzoj kaj iliaj gefiloj kaj japanlingve. Teru en sia studenteco loĝis en studenta kunloĝejo en Nara, kie ŝi lernis Esperanton, kaj ĉar la preleginto loĝis tie post tridekoj da jaroj, havis specialan kialon havi intereson pri ŝi.

LEGOKUNVENO

"Flugi kun kakatuoj"

* junio 9 (sab) 13h00-15h00 ĉambro 701

* libro: "Flugi kun kakatuoj" de Trevor Steele

* 5 kunvenintoj

La prikomentita libro estas fikcio pri la konflikto inter la praloĝantoj en Aŭstralio kaj

blankulaj novaj venintoj, en la posta duono de la 19-a jarcento. Sekvas 2 raportoj. Aliaj 2 raportoj japanlingvaj aperas en la julia n-ro de "La Tamtamo".

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti

■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO, Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458

■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: <http://www.hamarondo.org>

■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)



Rekomendinda al roman-amantoj

Mizro Iwaya

Kiam mi legas la libron, kiun mi jam legis antaŭe, mi trovas ke la komencaj kelkaj paĝoj implicas la venontan temon de la libro per karakteriza

epizodo. Tia estis ankaŭ tiu ĉi libro. Familio de praloĝantoj superspektas la ekspedicion de blankaj pioniroj, kiuj poste havas grandiozan festenon pro sia “valora” eltrovo.

En la 19a jarcento en Aŭstralio, britaj koloniistoj etendis siajn piedojn al la norda teritorio, kie praloĝantoj protektis plenforte sian vivon kontraŭ la “blankaj invadistoj”. Jen aperis la ĉefa temo: konflikto inter praloĝantoj kaj novsetlantoj. Praloĝantoj ne povis cedi ĉar ili dependis de la rikoltoj de la tero. Ankaŭ la invadantoj ne povis cedi ĉar ili dependis de la “voĉoj kaj subtenoj” de la blankaj setlantoj.

Sekvas pli kaj pli akutaj kolizioj inter ili. Praloĝantoj estas nombre majoritataj, sed ili ne posedas fusilojn. Samtempe ni devas bone kompreni, ke ili estis dividitaj en diversajn tribojn kaj bataladis inter si dum longa tempo. Tial la najbaraj triboj estis malamiko! Do ilia batalo, armile kaj aliance malsupera, estis dekomence destinita al malvenko. La aŭtoro

esprimas alian kaŭzon de ilia malvenko. La maljunuloj eĉ preferis submetiĝi al blankula socio, ĉar tio garantias sekuran manĝadon. Ili povis elekti nur unu el du; sekura manĝado sen libereco aŭ tradicia libereco kun vivminaco.

Mi vidis en *You Tube* ke la aŭtoro, Trevor Steele, prelegis en Parizo. Tie li klarigis la vivon kaj religion de la aborigenoj. Ili ne purigas sian ĉambron kaj domon, ili ne kutimas lerni konstante, ili havas unikan spiritismon kiu kuracas aŭ mortigas sen medikamento... Kompreneble kun rara escepto. Iu aborigena junulo en blanka socio, konsciinte sian devenon, komencis fervore studi en lernejo kaj fariĝis sukcesa advokato/entreprenisto en blankula socio.

La libro abundas je spektaklaj aventuroj kaj ekscitaj disvolviĝoj. Viglaj kaj movplenaj scenoj sekvas unu la alian. Tial mi povas diri ke ĝi estas unuaklasa distra romano. Ankaŭ la temo mem estas tre grava. En la fina ĉapitro tri flankrolantoj de la libro interparolas pri la konflikto inter praloĝantoj kaj novsetlantoj en ĝenerala formo. Eble ĝi estas resumo de la tuta historio. Do oni povas diri ke tiu ĉi libro komenciĝas per starigo de la temo, kaj finiĝas per resuma diskuto. Ellaborita konstruo.

Trista kaj Kruela

Impresoj pri la libro, “*Flugi kun Kakatuoj*”

AIDA Yayoi

Mi ne legis verkojn de Trevor Steele dum 5 jaroj post la legado de “*Falantaj muroj kaj aliaj rakontoj*”, “*Neniu ajn papilio*”, “*Memori kaj forgesi*”, “*Diverskoloro*”. Bonvenigante la novan libron mi malfermis kun freŝa atento kaj trovis ĝin interesa kaj stimula samkiel tiujn supre menciitajn. Inter ili mia plej favorata estis “*Neniu ajn papilio*”, kiu temas

pri suferantoj de deprima simptomo sekve de nazia persekutiĝo. Mi ne scias, ke “*Flugi kun kakatuoj*” fariĝos samgrade mia favorata libro aŭ ne, ĝi tamen sendube okupos la seĝon de unuaranga distraĵo pro ĝia grand-skala strukturo kaj allogaj scenoj. Mi legis ĝin ekscitite de bone plektita intrigo kaj samtempe emociite de la verkista pasio apelacii lian motiva al

legantaro. Lia literatura talento plene floradis en ĉi tiu libro. Ja estis admirinde.

La vidpunkto de Trevor Steele ĝenerale direktiĝis al socia maljusteco, socia malracieco, socia malekvilibro. Ĉi tiu nova libro ankaŭ apartenas al tia kampo. Li traktis en la dokument-stila romano la mizeran sorton de aborigenoj en Aŭstralio, kiuj de la antikvaj ‘praprapraavoj’ (laŭ la esprimo de la verkisto) vivis disiĝinte laŭ triboj sur la vasta tereno ĝis la invado de eŭropanoj en la dua duono de la 18a jarcento. Ili ne sciis ĉevalon nek ŝafon, kompreneble tute ne fusilon. La blankuloj senhonte rabis de tribanoj ilian landon kaj perfusile forpelis ilin. La libro priskribis malesperajn batalojn de aborigenoj kontraŭ blankuloj. La pereoj jam estis promesata de la komenca komenco. Malgraŭ tio ili ne povis eviti la batalon kiam mortigo, sklavigo, perdigo tiel kruele sieĝis ilin. En tiu senco ĉi tiu libro estas elegio kaj epitafio memore al malbonsorta raso.

La “kakatuoj” en la titolo de la libro simbolas la dignon kaj sopiron de aborigenoj. La trankvila flugado de la birdoj sub la ĉielo estis

impresplena. La protagonisto Jangabara ĉe la flanko de aborigenoj ravite de preterflugantaj kakatuoj kredis, ke ili benas lian mision kiel gvidanton de la milito. Li tamen ne povis plenumi la mision, vane mortigita. La heroo mortosceno estis trista. Kvankam li batalis por savi aborigenojn, li mortis pro perfido de samrasa militisto. Li mem povis uzi fusilojn tre lerte, sed milito-taktikoj de aborigenoj ĝenerale estis primitivaj; mokdancoj, kriegoj kaj ornamaĵoj de birdoplumoj aŭ kanguruvostpeltoj. Ili lernis pli-malpli uzadon de fusiloj, sed nenian sukceson ili gajnis antaŭ multegaj kugloj de Winchester.

Kiam la protagonisto Jangabara estis mortpafita, “li soris for kiel majesta kakatuo, rekte en la brakojn de la bonvenigantaj spiritaj Antaŭuloj.” Ni komprenas ĉi tie, ke la kakatuo aperas en la plej grava momento kiel simbolo de la ligilo inter homoj sur la tero kaj antaŭuloj en la ĉielo. Kvankam lia korpo frakasite falis kaj falis, lia spirito ne mortinte flugis supren al la ĉielo. Pro tiu lasta sceno mia koro iom konsoliĝis, ĉar la morto de la kuraĝa batalanto ne estis tiom mizera kiom trista.

BELETRO



Unu pirarbo --- rakonto de Serbio (4)

Vasilij Eroŝenko

Komuna traduko esperanten de Jokohama Salono

原作：ワシリー・エロシエンコ「一本の梨の木」(1921)

Parto 5 (laŭ Sibayama Zyun'iti)

La plej aĝa frato, la meza frato, la plej juna frato, ili ĉiuj pasigis preskaŭ unu jaron kvazaŭ en sonĝo. Venis la lasta tago de la jaro, kiun ĉiuj el la tri fratoj sonĝe pasigis for.

En la oficejo de la dia paradizo, la Dio kaj la anĝelo hazarde vizitinta, havis jenan interparolon.

“Mi serĉis en mia taglibro, ĝuste tiun ĉi tagon de tiu ĉi monato antaŭ jaro, kaj mi trovis noton pri la tri fratoj, pri kiuj mi petis vian zorgon. Nu, temas ĝuste pri tiuj, al kiuj mi donis nur unu pirarbon. Vi multe klopodis tiam, jen transforminte vin al almozulo aŭ pastro. Nu, kiel

fartas la tri fratoj nun? La plej aĝa frato ofertita je vinberfabriko, la meza frato ofertita je mastreco de paŝtejo, la plej juna frato, edziĝinta al la plej molkora princino --- kiel ili poste fartis? Ĝuste unu jaron poste, mi denove petas vian kontrolon. Se iu rajtas je pli da feliĉo ol la nun havata, tiu ricevu pli, sed se iu ne rajtas eĉ je la nuna feliĉo, tiu perdu, laŭ via bontrovo.”

“Laŭ via volo!”

Tial la anĝelo iris observi la vivon de la tri fratoj. La plej aĝa frato estis reĝo de la vino, konata de ĉiu en la proksimaj landoj.

Iun tagon, la fabrikon vizitis almozulo kun

mizerega ŝajno, kaj anhele elparolis.

“Mi petas vian favoron. Indulgu min, ke mi dezirus nur glason da vino, tiu vino ruĝa kiel sango. Mi petegas.”

Ĝuste tie estis la fabrikestro, ruĝvizaĝa kaj dike dikega, jene respondis.

“Hu, kia impertinenta almozulo vi estas. Ne troviĝas vino por oferti al vi. Se vi aŭ similaj ulaĉoj ricevus po unu glaso, mi fariĝus ja almozulo...”

Li malicege diris tiel, kaj penis forigi la almozulon kvazaŭ piedbate.

Tiun momenton, la almozulo transformis sin. Aperis tie la pastro, kiun la mastro devus ne forgesi eĉ en sonĝo, kaj krucosignis sur aero... jen la unu jaro foriris kiel sonĝo.

La larĝa rivero fluis malrapide kaj kviete kiel de antikvo, kaj la bruega sono de la fabriko ne aŭdiĝis. Ne nur tio, sed eĉ ne troviĝis eĉ kabano.

Al la plej aĝa frato forlasita kun gapa mieno, aŭdiĝis jenaj vortoj de ie ĉirkaŭe.

“Vi revenu en la domon de la antaŭa vivo. Vi neniam petpreĝu. Ne plendu. La Dio ne havu pluan zorgon per via preĝo. Vi vivadu tenante la ununuran pirarbon. Vi ne rajtas postuli pli.”

La vespera sonorilo mallaŭte sonoris. La plej aĝa frato sur digo de la rivero, ne plu povinte preĝi, falis tie por ploraĉi.

Parto 6 (laŭ Murata Kazuyo)

Ankaŭ al la fabriko de la dua frato la almozulo venis. Kiel same antaŭe li petis unu tason da lakto. Ĝuste tiam venis la mastro.

“Ne diru absurdaĵon. Se mi donus al vi lakton ĉiutage, jam de longe mi estus almozulo, kiel vi!”

Tiel dirinte li forpelis la povran almozulon, kiu abrupte ŝanĝiĝis al la pastro, kaj signis krucon. La granda fabriko, kie ĝis tiam monte abundis lakto, fromaĝo kaj butero tuj malaperis. Krome en la vasta paŝtejo, la plenpleno de ŝafoj kaj bovoj ŝanĝiĝis al la kolomboj, kiujn li vidis antaŭ unu jaro. Kaj ili ĉiuj forflugis por elmigri kun sono de flugilo.

Antaŭ unu jaro, la dua frato venis kun la pastro al tiu vasta ebenaĵo, kaj nun li meze staris foranime. De ie sonoris tia voĉo:

“Vi revenu al via hejmo, kaj gardu la ununuran pirarbon same kiel antaŭe. Ĉar vi ne havas indecon plu. Ekde nun vi ne preĝu al la Dio, do la Dio ne plu zorgos pri vi.

Kaj ne plendu, ĉar vi ne havas kvalifikon...”
La unu jaro estis vere efemera sonĝo.

Parto 7 (laŭ Sibayama Noriko)

Ankaŭ al la plej juna frato, kiu loĝis en kvieta domo en la profunda arbaro, venis unu almozulo, kaj diris:

“Permesu min diri kuraĝe. Ĉu vi bonvolus lasi min tranokti hodiaŭ?”

“Volonte! Jen estas mizera dometo kiel vi vidas, des pli senĝene eniru. Bonvolu tranoktadi laŭ via plaĉo.”

La geedzoj bonvenigis lin, tamen ili estis tiel malriĉaj, ke ili apenaŭ manĝis ĉiutage, tial ili eĉ ne povis baki porgastan panon ĉiom el nura tritiko. Ili miksis tritikon kun muelita arboŝelo kiel kutime, kion ili bedaŭris.

Malgraŭ tio, mirinde, la pano estis tiel bongusta kvazaŭ ĝin oni vendus en urbo, krome akvo servita en glaso fariĝis bela lakto kvazaŭ ili vidus ĝin en la paŝtejo de la dua frato.

Krom tio pli da mirindaĵo okazis. La almozulo, kiu petis unu tranokton, fariĝis pastro dum ili ne rimarkis, kaj li silente faris signon de granda kruco.

“Vi ambaŭ devas okupi pli gravan postenon. De nun vi estu gereĝoj de tiu ĉi lando.”

Tiel dirinte malaperis la karmemora pastro, kiun ili neniam forgesis.

Do, kio okazis? Ilia mizera dometo fariĝis belega palaco kun impona pordego ĉirkaŭita de fosaĵoj kaj bariloj. Kaj granda arbaro, kie estis la dometo, ŝanĝis sin en belega parko konservante kvieton.

Tiel la geedzoj fariĝis heredantoj de la reĝo de tiu ĉi lando, nome patro de la edzino.

Kiom ĝojis la patro kaj popolo!

Atentu karaj! Kiel mi rakontis, tiu, kiu malmulton deziris, ricevis plej multon kontraŭe. Tiuj, kiuj avide deziris, havis rezulton, ke ili devas gardi unu pirarbon.

Nuntempe inter riĉuloj troviĝas senkaŭze eksterordinare ordonemaj uloj. Sed se anĝelo ekzamenus riĉulojn, kiom da ili povus daŭre teni la riĉecon? Mi ĉiam pensas. Multaj el nunaj riĉuloj ne havas kvalifikon por gardi eĉ nur unu pirarbon.

(fino)

